NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
JANUARO 1997

**ZAMENHOFA BANKEDO**

Kvankam la etoso estis trista ĉar mankis nia prezidanto, Juan Carlos Ruiz, kiu suferas gravan malsanon, la 14a de decembro 40 samideanoj kaj simpatiantoj kune tagmanĝis en la restoracio de Hotel Puerta de Toledo.

**KRISTNASKA LOTERIO**

Unu jaron pli, la vendado de loterio estis sukcesa. Ni aĉetis 735.000 ESP kun profiton de 172.350 ESP, plus la eldonado de bloketoj donacita de Paco Jiménez, kaj ĉio dank' al la helpo de liceanoj kaj amikoj. Ni tre dankas vian helpon al la ekonomio de la Liceo.

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

T$^3$-paĝo kun la nomo "Esperanto España" aranĝita de Jesús de las Heras.
http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html
Revuo "Kajeroj el la sudo":http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.html
Jesuo petas opinion pri la paĝoj kiuj inkludas diversajn dokumentojn hispane kiel *El Correo de Esperanto* kaj la eseon de Mark Fettes *¿Una lengua para Europa?.*

**HISPANIO**

En **Segovio**, César de Mosteyrín, laŭ la metodo "Jen nia mondo" instruas en tri lokoj: Escuela Oficial de Idiomas (tri gelernantoj estas profesoroj de la angla), Preĝejo Cristo del Mercado kaj Kultura Tri-aĝa Centro de Caja Segovia. Ankau pere de koresponda kurso havas gelernantojn en Ekvatoro, Kubo kaj en diversaj provincoj de Hispanio. La eksterlandanoj aliĝis al la kurso pere de anonco (pagita de César) aperinta en la revuo "El Correo" kiu estas distribuita en Hispan-Ameriko.

**ESPERANTO EN TV**

TV-Castilla y León intervjuis al César de Mosteyrín en magazino. Li atingis almenaŭ unu lernanton.

**CD-DISKO EN ESPERANTO**




Privata entrepreno, kun la helpo de HEF-CO por selekti tekstojn, eldonis CD-diskon titolitan "Esperanto". La skatolo inkludas libreton kun teksto en diversaj lingvoj, inter ili esperanto. La disko estas en la listo de "La 40 ĉefaj" en la radio kaj estis anoncita en TV kaj pere de katalogo de la granda vendejo Alcampo, kiu enleterpoŝtiĝas al miloj da domoj.

***HEF ANGULO***

Estas preta oficiala amassendo de la Federacio al multege da amaskomunikiloj, ĵurnalistoj kaj organizoj por diskonigi la tekston de la **Manifesto de prago** kaj kolekti subskribojn.

**KORESPONDA KURSO**

HEF-Co organizas, je nacia nivelo, koresponda kurso (poŝte kaj pere de *internet*, lau la libro "El esperanto: curso de la lengua internacional". La materialo inkludas libron, ekzercojn kaj kasedon. Prezo: 9.900 ESP. Pago: remburse aŭ pere de bank-konto Caja Postal n° 14.011.966, je la nomo de Federación Española de Esperanto

## LITERATURA PREMIO "Francisco Máñez"

La verkoj devas tuŝi la valorojn de la homa animo, kun la celo atingi bonan komunikadon inter homoj. Devas esti originalaj en esperanto. Premio konsistos en 250.000 ESP. Limdato por akcepto la 14-an de aprilo. Pli da informoj: Sociedad Cultural Ateneo "La Alianza". Plaza Doctor Cajal 11. 46380 Cheste

## NOVA LIBRO-NOVA LINGVO

Ibera Liberecana E-grupo de Madrido, kune kun la Fondajo "Anselmo Lorenzo" kaj la apogo de la kolektivo "Mujeres Libres" de Villaverde Alto (Madrid) eldonis libreton, verkitan de Luis Ojer titolita "Novesperanto". Laŭ la aŭtoro la nova lingvo kiun li proponas, sen supersignoj, estas pli facila ol la tradicia kaj ankaŭ ne seksista. La verko inkludas gramatikon, ortografion por traduki la signojn kaj vortaro de pli ol 5000 fakvortoj en novesperanto, esperanto, ido kaj hispana lingvo. Kosto 750 ESP. Vendo-adreso: Luis Ojer. Apdo 14.159. 28080 Madrid.

## ANARKIISMO KAJ ESPERANTO

La Internacia Laborista Asocio (anarkiista) celebris sian 20-an Internacian Kongreson en Madrid. Unu el la sekcioj estis pri Esperanto, ĉeestis Luis Ojer.

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La Estraro de nia organizacio kunvokas vin ĉeesti tiun kunvenon, kiu okazos lastan lundon de januaro (27-an) je la 18.30 en unua kunvoko kaj je la 19.00 en dua, en la side o de MEL, sub la sekva tagordo:

1.- Informo pri membraro
2.- Legado kaj eventuala aprobo de la antŭa protokolo
3.- Detala raporto pri MEL-agado dum la jaro 1996
4.- Prezento de programo realigebla por la jaro 1997
5.- Aktuala konto-estato de MEL
6.- Buĝeto por 1997
7.- Parta, laŭstatuta renovigo de la ĝisnuna Estraro
8.- Sugestoj kaj demandoj kun iliaj laŭokazaj konkludoj.

Cele al bonorda kaj pozitiva funkciado de nia organizacio, la Estraro restos danka, se ĉiuj gemembroj akurate ĉeestos tiun Ĝeneralan Asembleon.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

49-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio. 10-17 majo 1997. Koŝice, Slovakio
3-a Europ-Unia E-Kongreso. 16-19 majo 1997. Stutgarto (Germanio)
82-a UK de Esperanto. 19-26 julio 1997. Adelajdo (Aŭstralio)
7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo. Valencio (Hispanio) 8-13 julio.
83-a UK de Esperanto. 1-8 aŭgusto 1998. Montpeliero (Francio)

:::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# Festi lingvojn per fulmokursoj

**La usona esperantisto Dennis Keefe, konsilisto pri lingvoinstruaj programoj en Usono kaj Francio, elpensinto de la E-kurso BEK, vivas en Tours (Francio). Tie li okazigis en pasinta marto, jam duafoje, la eventon LinguaFest' (LingvoFesto). Ties vizitantoj povas partopreni ekspresajn kursojn kiuj enkondukas al dekoj da konataj kaj malpli konataj lingvoj, i.a. Esperanto.**

*Kio igas LingvoFeston unika?*

Ekzistas ja t.n. "festivaloj de lingvoj", sed ili kutime estas miksaĵo de muziko, danco, manĝaĵoj, kulturo, kaj eventuale iom pri lingvo. En LingvoFesto kernas la lingvoj mem. Tio estas malofta; mi neniam aŭdis pri festivalo kun tiom da lingvoj instruataj.

*Kio inspiris la ideon de tiu festo?*


Multe da inspiro venis el miaj konversacioj kun J. Milton Cowan, kiu dum la dua mondmilito estris la lingvoprogramon de la usona armeo, kaj poste tiun de Universitato Cornell. Li kutimis uzi personojn kiuj neniam antaŭe instruis lingvon. Je la Esperanta flanko, LingvoFesto ĉerpis sian principon el Muestra de Esperanto ("Ekmontro de Esperanto"), organizita unue en 1980 ĉe la Madrida Liceo de Esperanto sub la gvido de Augusto Casquero. Laŭ tiu principo, oni unue montru al la publiko iom pri Esperanto, resp. pri multe da lingvoj, kaj poste iuj deziros lerni la lingvo(j)n.

*Kion fakte celas la aranĝo?*

La ĉefa celo estas ke ĉiuj — la publiko, la instruantoj kaj la helpantoj — distriĝu. Aliaj celoj estas pli konigi multajn neinstruatajn lingvon (el la 67 lingvoj de LingvoFesto '96 nur ses aŭ sep estas instruataj en nia regiono de Francio) kaj interkonatigi eksterkaj hejm-landanojn. Por multaj la festivalo estas la unuura okazo ekkoni samregionanojn eksterlandajn.

*Kiel vi varbis la instruistojn de la diversaj lingvoj?*

Por trovi 70 instruantojn de 67 lingvoj mi pridemandis inter 200 kaj 300 personojn kaj sendis pli ol 400 leterojn, 140 el ili al ambasadoj en Parizo. Tamen el ambasada fonto venis nur du instruistoj! Multajn mi invitis el universitatoj, profesorojn kaj studentojn. En centroj por enmigrintoj mi trovis la instruantojn, ekzemple, de la albana, somalia, kurda kaj ukraina lingvoj. Esperanton instruis, cetere, Dominique Baron.



Dennis Keefe

*Ĉu estis profesiuloj inter la instruistoj?*

Malpli ol 20 procentoj. La plejparto neniam instruis sian lingvon.

*Ĉu lokaj esperantistoj kunlaboris?*

Sen ili LingvoFesto neniam estus okazinta! El la 9 ĉefaj helpantoj 8 parolis Esperanton.

*Kiel vi klarigas la relative altan ŝaton de Esperanto ĉe la publiko?*

Efektive, laŭ partopren-ciferoj ĝi estis la kvina plej vizitata lingvo el 32 lastjare kaj la sepa el 67 ĉi-jare. Nu, la publiko venis por vidi ion novan, ion nekutiman, kaj por la plejparto Esperanto estis tia. Se Esperanto ĝuus pli da reklamado, ni vidus eble eĉ dekaŭ dudekoble pli da lernantoj.

*Ni scias ke post la du festivaloj novaj lernantoj de Esperanto anonciĝis. Sed ĉu ankaŭ aliaj lingvoj de LingvoFesto akiris novajn lernantojn?*

Ho, jes! Eĉ multe pli ol Esperanto. Ekzemple 15 personoj iris al kursoj pri la araba, kaj dekoj da homoj ekinteresiĝis pri mansigna lingvo.

*Ĉu la aranĝo estas memfinanca?*

Preskaŭ. En 1996, por la dua LingvoFesto, mi konscie rifuzis financan helpon. Mi deziris montri ke io povas sukcesi sen publika mono. Ni uzis nenium subvencion, krom 6500 frankoj [ĉ. 2100 gld.] de la banko Crédit Agricole por anonc-afiŝoj. Flanke, ni ricevis po 400 frankojn de kelkaj asocioj, lingvolernejoj ktp, kiuj starigis dutagan standon en la festivalo. Mi mem elspezis proks. 4000 frankojn el propra poŝo. Mi pensas ke ni havis la plej grandan aktivaĵon en Tours sen monhelpo. Tamen, nun ke mi montris la eblecon de festivalo sen subvencio, ni povos fari kiel aliaj grandaj festivaloj, kiuj ja uzas subvenciojn.

*La populareco de la aranĝo salte kreskis de 1995 al 1996: 780 gelernantoj pasintjare, pli ol 2300 en 1996. Kiel vi klarigas tion?*

Laŭ enketo kiun ni faris kun partoprenintoj de la festivalo, la plimulto venis pro rekomendo de amiko aŭ konato kiu vizitis en la unua jaro!

*Ĉu vi antaŭvidas pluan kreskon?*

Jes. Kiam la lernejoj finfine vidos la kulturan valoron de la afero, estos eble kvin aŭ dek mil partoprenantoj jare.

*Kiam okazos la tria LingvoFesto?*

En marto 1997, same en Tours. Sed sciu ke ĝi estos la tria *granda*. Intertempe oni aranĝos aliajn festivalojn malgrandajn. La ideo rapide populariĝas, nun vilaĝoj kaj kvartaloj deziras fari sian propran lokan festivalon.

*Ĉu do aliaj urboj povus fari siajn proprajn LingvoFestojn?*

Mi havas la kopirajton por la nomoj LingvoFesto kaj LinguaFest'. Tamen iu ajn skriba petanto povos uzi ilin senpage por almenaŭ unu jaro — aŭ uzi similan nomon sen peti mian permeson. Mi baldaŭ diskonigos trarete mian konsilaron pri sukcesa organizado de Festivalo de Lingvoj. ★

*Por pliaj informoj pri LingvoFesto, kontaktu: http://www.geocities.com/Athens/5183/ aŭ dekeefe@lenet.fr.*

**Estas tempo rekotizi por 1997!**
Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. **Antaŭdankon!**

**INFORME ECONÓMICO DE ESPERANTO-LICEO DE MADRID. 1 9 9 6**
Atocha 98-4º. 28012 Madrid

## GASTOS E INVERSIONES

| | |
|---|---|
| Mobiliario | 6.900 |
| Biblioteca | 750 |
| Correo | 17.595 |
| Mantenimiento | 1.875 |
| Alquiler | 421.527 |
| Libros | 32.714 |
| Suscripcion a revistas | 22.490 |
| Cuotas MEL (HEF,UEA, etc) | 11.900 |
| Publicidad | 2.567 |
| Edición "Nia Voĉo" | 15.000 |
| Luz | 16.599 |
| Teléfono | 21.216 |
| Comisión banco | 250 |
| Gastos extraordinarios | 15.237 |
| TOTAL GASTOS E INVERSIONES | 586.620 ESP |

## INGRESOS Y VENTAS

| | |
|---|---|
| Libros | 85.207 |
| Libro "E-0 fenómeno" (73 ejs) | 73.000 |
| Cuotas de socios 1996 | 74.000 |
| Cuotas de socios 1997 | 14.000 |
| Socios colaboradores | 300.000 |
| Suscripciones Nia Voĉo | 8.405 |
| Otras ventas | 22.100 |
| Donativos | 15.870 |
| Loteria 1996. Beneficio neto | 172.350 |
| Gestiones diversas | 9.949 |
| Intereses banco | 166.292 |
| Ingresos extraordinarios | 4.000 |
| TOTAL INGRESOS Y VENTAS | 945.173 ESP |

**RESULTADO DEL EJERCICIO (beneficio) ......... 358.553 pesetas**

Deudores:

| | |
|---|---|
| HEF-CO | 40.000 ESP |
| Hogar P. Toledo. Fra. 5/96 | 17.529 " |
| Lotería. J.M. | 1.000 " |
| Casa del Libro. Fra. 10/96 | 12.392 " |
| TOTAL .......... | 70.921 ESP |

Tesorería:

| | |
|---|---|
| c/c banco Atlántico a 26-2-1996 | 624.558 ESP |
| Cuenta en UEA-Rotterdam | 10.707 " |
| Depósito a plazo | 2.500.000 " |
| Caja | 9.265 " |
| **TOTAL ......** | **3.144.530 ESP** |

El tesorero

**Música**

■ L. R.

"Marca" 98-12-27

# Esperanto, un siglo después

**CLASICA**
**Título:** Esperanto
**Intérpretes:** Varios

## UN MENSAJE DE PAZ SIN BARRERAS

■ En 1887, L. L. Zamenhof publicó, bajo el seudónimo de Dr. Esperanto, un modesto libro titulado Lingvo Internacia. Este libro pretendía ser un proyecto de lengua internacional que fuera utilizado como segunda lengua para superar las barreras linguísticas entre los pueblos.
Un siglo después, un colectivo de músicos reivindica este mensaje de entendimiento universal. El resultado es un disco en el que se dan cita las más bellas melodías de música clásica adaptadas al sonido electrónico actual e interpretadas por instrumentistas y cantantes de tres continentes, en un esfuerzo por tansmitir belleza y paz.
Las letras están es Esperanto, un idioma de raíces románicas que sigue progresando en nuestros días.
Precisamente, y aunque muchos artistas utilizan el Esperanto como vehículo creativo, han sido los miembros de El Bosco quienes se han lanzado a la aventura de reivindicar esta lengua. Tras tres años de gestión y lucha, este disco sale al mercado en Navidad, fecha propicia para que el mensaje de paz llegue con todavía con más razón si cabe.




MAS ESPERANTO